# Kontraû la piedŝvito!

**Hermes**  **Hermes**

Ni ne bezonas atentigi la interesulojn pri tio, ke la piedŝvito *ne* estas malsano sed pro ĝia malbonodoreco vere granda malagrablaĵo ne nur por la piedŝvitanto mem sed precipe ankaû por lia ĉeestantaro. — Sed ne ĉiuj scias, ke la piedŝvito *mem* ne estas malbonodora.

La malbonodoreco nur fariĝas post kiam, per bakteria influo, la piedŝvito pudriĝas. Tiam sentiĝas ne nur la malbonodoro tiel ega, sed la pudriĝanta piedŝvito efikas samtempe grandan inflamon de la haûto, tiamaniere ke nun fariĝas la *„doloregaj ŝvitpiedoj"*, al multaj sufiĉe bone konataj.

Kiu do deziras seniĝi ne nur de la malbonodoro sed samtempe ankaû de la doloroj kaj de ĉiuj aliaj malagrablaĵoj, kaûzitaj de la piedŝvito, tiu aĉetu la

**antisepsajn alplandojn „Hermes"** + Pat. 40,178. D. R. G. M. 390,412.

per kies aplikado la piedoj estos tuj resanigataj.

Legu atente la sekvantajn, el granda amaso elektitajn atestojn de kuracistoj, fratinoj malsanulistinaj, k. t. p. kaj notu je mendoj la numeron aû la longecon de viaj ŝuoj, kaj aldonu ĉu por sinjoroj? ĉu por sinjorinoj?

La transsendo efektiviĝas afrankite kaj la enkasigo pagoŝarĝe

Mi kalkulas „Hermes" por sinjoroj fr. 2.— (0,8 Sm)

„Hermes" por sinjorinoj fr. 1.80 (0,72 Sm)

La transsendaj kaj enkasigaj poŝtelspezoj por 1 paro de la „Hermes" sumiĝas je 20 centimoj (0,08 Sm)

La transsendaj poŝtelspezoj por 5 kilogramoj estas fr. 1.25 (0,5 Sm).

Ĉiujn mendojn kaj demandojn oni adresu al

**D^ro E. Capeder, Chur** (Coire), Svisujo.

---

## Atestoj

La malbonodora piedŝvito estas ne nur maloportuna por la ŝvitulo mem, sed ankaû por la ĉeestantoj. Se nun la piedŝvito, ensorbita per la ŝtrumpoj, pudriĝas, tiam samtempe naskiĝas la malbonodoro, kiu forkurigas eĉ plej grandan ĉeestantaron. Ĉiuj ĝisnunaj kuraciloj [pulveroj, fluidaĵoj por enpenikado de la plandoj, banoj, lavoj k. t. p.] nur malplene atingis la celon, kaj vera pliboniĝo neniam okazis.

Sinjoro D^ro Capeder nun sukcesis fabriki per absolute ne malsanigaj rimedoj, impregnitan alplandon, per kies laûordona aplikado, la piedŝvito estas forigata je kiel eble plej longa daûro.

Farinte tiun ĉi observadon multfoje dum mia kuracista praktikado, mi ne prokrastas rekomendi treege la supre nomitan alplandon „Hermes", al ĉiuj kiuj suferas je forta piedŝvito

kun estimo

*Chur* la 25 an de Majo 1908.

*D^ro Scarpatetti,* kuracisto.

---

La subskribinto tre volonte certigas, ke la antisepsa kaj asepsa enmetebla alplando, fabrikata de sinjoro D^ro Capeder ✠ Pat. 40178., post nur tre mallongdaûra aplikado, *sen ia sekvinta malsaniga fenomeno,* plene forigis la piedŝviton al sia nur sepjara fileto, kiu tamen aliel treege suferis je granda kej malbonodora piedŝvito.

La supre nomita enmetebla alplando „Hermes" estas do kiel eble plej rekomendinda.

*Chur* la 16 an de Majo 1908.

*Christian Ammann.*

skribisto ĉe la ŝtata kancelario.

Sinjoro D^ro E. Capeder, Chur

Miaj provoj per la enmeteblaj alplandoj „Hermes" ĝis nun nur estis maloftaj. Liverinte ĉi tiuj maloftaj provoj tre respektindajn resultojn, mi ankaû en la venonto, je taûgaj kazoj, rekomendos tiujn ĉi alplandojn. Jaj fiefikoj de mi ne estas observitaj.

*Ems* la 31 an de decembro 1908.

*D^ro med. A. Fetz.*

Sinjoro D^ro E. Capeder, Chur.

Laû peto mi volonte certigas, ke mi faris tre bonan sperton per la lastjare de vi, por mia 21 jara filo ri-

cevitaj alplandoj „Hermes“. Lia tre malagrabla piedŝvito, kiu iam kaŭzis ĉiutagan ŝanĝon de ŝtrumpoj, nun estas malpliigita je agrabla, minimuma grado. Post tiu procedo oni ne povis observi eĉ la plej malgrandan eton de malsaniĝo, kio laŭ diro kelkfoje estus okazinta post alia pera forigo de la piedŝvito. Mia filo estas ĉiam sana kiel la fiŝo en l'akvo, kaj ni estas kontentaj ke ni sukcesis forigi la piedŝviton tiel facilmaniere.

Pro tio mi rekomendas treege la alplandon „Hermes“ ✠ Pat. 40178 al ĉiuj piedŝvituloj.

*Chur* la 10 an de Januaro 1910.

*C. Patzen*,
administranto de la ŝtata punejo.

---

Sinjoro D^ro^ E. Capeder!

La provo kiun mi faris per la antisepsa enmetebla alplando de sinjoro D^ro^ Capeder, vere estis eksterordinare sukcesplena. Suferinte alie la tutan jaron je piedŝvito, kiun mi neniel povis daŭre forigi, mi nun sukcesis forigi la piedŝviton, uzinte la Hermes post nur unu taga aplikado. Ĉi tio foriĝis sen iaj maloportunaj aŭ malsanigaj sekvoj. La efiko estis vere daŭra, tiamaniere ke nur post 5 monatoj la piedŝvito ree pliiĝis, sed ne malbonodore. Post 6 monatoj la piedŝvito refoje malbonodoriĝis kaj mi denove samsukcese uzadis la supre nomitajn alplandojn. Tiuj ĉi estas do laŭ mia sperto bonega kuracilo kontraŭ la tre malagrabla piedŝvito.

*Chur*, la 24 an de Majo 1908.

*D^ro^ Hans His*, Ĥemiisto.

---

Tre estimata D^ro^ Capeder.

Mi sciigas vin, ke mi elprovis viajn asepsajn alplandojn ✠ Pat. 40178 je mia propra korpo. La sukceso min tiel kontentigis, ke mi jam estas ofte nun estas rekomendinta ilin al aliaj piedŝvituloj. Via „Hermes“ ne nur sukcesis tutplene ĉe mi mem, tiamaniere ke la granda ŝvito kaj forta odoro tramonate estas forigita, sed ankaŭ ĉe ĉiuj kiuj laŭ mia ordono aplikis la alplandon „Hermes“. Dezirante esti utila al la piedŝvituloj, mi rekomendas sincere la alplandon „Hermes“ al ĉiu piedŝvitanto. Samtempe per tiu atesto mi volonte kunhelpus forigi la *disvastigatan* sed tamen *eraran* opinion, laŭ kiu la forigo de piedŝvito povus sekvigi malsanigajn efikojn.

Refoje mian plej koran dankon.

*Chur*, la 11 an de Junio 1908.

*fratino Babetta Meier*, malsanulistino.

---

Sinjoro D^ro^ Capeder, Chur.

Mi tre ĝojas povante vin sciigi, ke via antisepsa alplando „Hermes“ estas vere bonefika kuracilo kontraŭ ĉiuj fenomenoj de la piedŝvito, disvastigata tiel ofte, ĉe ni. Ĉiuj malhelpaĵoj, kiuj en mia milita profesio, precipe dum la varmega sezono, kaŭze de vundaj piedoj, ofte aperas, (ekzemple post longdaŭra marŝado en la montaro) malaperis kaj ne reaperis eĉ post nur mallongdaŭra aplikado de tiu ĉi agrabla alplando „Hermes“.

Ĉi tiu, la haŭton tananta kaj samtempe la ŝuojn desinfektanta preparato estas tre taŭga por alporti grandan agrablon al multaj kies profesio tre ofte postulas grandajn marŝojn. *Mi opinias, laŭ miaj personaj spertoj, ke la aplikado de ĉi tiu alplando* („Hermes“) en la *militservo por la trupo* tre bone estus rekomendinda altestime

*Chur* la 28 de November 1908.

*Majoro O. Willy*,
komando de la fuziliera-bataliono 91.

---

Estimata sinjoro D^ro^.

Respondaute vian leteron de la 12. c. mi havas la honoron sciigi al vi, ke la alplando „Hermes“ ĉe mi mirege efikis. La piedŝvito nun malpliiĝis je minimuma grado, tiamaniere ke nun mi neniel suferas.

Malgraŭ la oftaj banoj, mi alie estis ĉiutage devigata lavi kaj enŝmiri la piedojn, kaj ŝanĝi la ŝtrumpojn eĉ ĝis *dufoje dum unu tago*. Post la aplikado de viaj „Hermes“ mi nun estas liberigata de l' piedŝvito kune kun la aliaj temporapantaj malagrablaĵoj. Akceptu mian kiel eble plej grandan dankon.

*Bern* la 17 an de Decembro 1908.

*M. Dosch*, poŝta revizoro.

---

Tit.

La subskribintoj per tio certigas, ke ili ĝuis per la alplandoj „Hermes“ de D^ro^ Capeder, la plej grandajn servojn. Tial ni dankeme rekomendus kiel eble plej, la „Hermes“. La „Hermes“ ne nur malebligas la malbonodoron sed ĝia aplikado estas ankaŭ tre agrabla.

*fratino Albertina Isler*
*fratino Marie Auer*,
malsanulistinoj.

*Chur, urba malsanulejo* la 28 an de Janaro 1909.

---

La subskribinto diverskaze ordonis la antisepsajn alplandojn „Hermes“ de D^ro^ Capeder, kaj estas plene kontentigita je siaj pacientoj. La maloportuna piedŝvito tre rapide malaperis kaj okazis daŭra sekiĝo de la piedplandoj kaŭze de malforta supraĵa tanigo de la epidermo.

Ĉar mi plene konas la kunmetitajon kaj la fabrikadon de la „Hermes“, plue ĉar mi *neniam estas rimarkinta* iajn malagrablajn fiefikojn (cetere absolute ne atendotaj je laŭordona aplikado) mi ne ŝanceliĝas sincere rekomendi la „Hermes“ al la tuta piedŝvitantaro, atentigante je preciza laŭordona uzmaniero.

*Chur*, la 16 an de Februaro 1908.

*D^ro^ P. Plattner*,
ĉefkuracisto de la hospitalo.

Mi serĉas en ĉiuj urboj agentojn kaj revendistojn.